

Babilada rondo

... okazas je la 19-a ĉe unu aŭ la alia el la esperantistoj, kiuj deziras plibonigi sian lingvon parole. Ĉiuj konsentas korekti unu la alian. Poste, ni kune manĝas la «kanadan» piknikon alportitan de ĉiu.



La venontaj renkontoj okazos
ve, la 6-an de aprilo

...ĉe Charlotte Blanc-Maillard
Av. Nestlé 9, Vevey
021 922 34 74
079 393 32 63

ve, la 20-an de aprilo

...ĉe Marie-A. kaj Knud Sunier
Av. des Alpes 150, Montreux
021 961 38 56

***** ATENTU *****

Aliĝu al «Doodle» por la venontaj
bazaraj budoj:

<http://www.doodle.com/6zcwtq9pp9ayh38r>



**Ne venu ĉe la Laŭzana
bufedo por la venonta
kunsido... sed en
Le Magasin du Monde
de Vevey je la 18-a.**



**Notu ke la inaŭguro de
la ekspozicio de Vevey
kun prelegeto de nia svisa
prezidanto okazos
merkrede la 4-an de
aprilo je la 17-a.**

Laŭzana Esperanto - Societo

Poŝtfako - Case postale 246 * CH - 1000 LAUSANNE 22
+41 (0)76 411 14 55 * +41 (0)21 647 29 28
esperanto@citycable.ch * www.esperanto.ch/Lausanne
Poŝtĉekkonto - CCP 10-26785-8

Prez.: David Bühlmann * 021 624 36 38 - Vicprez.: Charlotte
Blanc Maillard * 079 393 32 63 - Sekr.: Francisko Randin *
076 411 14 55 - Kasisto.: Knud Sunier 021 961 38 56

Laŭzana Esperanto-Societo

Informilo

Aprilo 2012 - n° 04

Lunde la 2-an de aprilo 2012,

ATENTU...

Ne ĉe la bufedo de Laŭzano sed en Vevey

Karlota kaj Sonja atendas vin je la 18-a por
la preparado de la ekspozicio en
« Le Magasin du Monde », rue du Conseil 20

Lunde la 7-an de majo

Karlota parolos al ni pri la ekspozicio

Sabate la 9-an de junio

Ekskurso

Lunde la 3-an de septembro

Decidota

Lunde la 1-an de oktobro

Decidota

Lunde la 5-an de novembro

Decidota

Sabate la 15-an de decembro

Zamenhofa festo

La varma kaj tenera fabelo pri la varmaj tenerdolĉaĵoj

de Claude M. Steiner tradukita de E. Chibleur (dua parto)

Baldaŭ ĉiuj rimarkis la mankon de varmaj tenerdolĉaĵoj kaj ĉiuj sentis sin malpli varmaj kaj malpli dolĉaj. Homoj ĉesis rideti, ĉesis esti afablaj. Kelkaj komencis ŝrumpiĝi, eĉ kelkfoje ili mortis pro la manko de varmaj tenerdolĉaĵoj. Pli kaj pli da homoj aĉetis ĉe la sorĉistino magiajn trinkaĵojn kaj pociojn. Ili tute sciis ke tio estis ne utila sed ili ne trovis ion alian. La situacio malpliboniĝis. Tamen la aĉa Belzefa ne deziris la morton de la homoj. Mortintoj ne plu povas aĉeti ion ajn !

Tiam ŝi perfektigis alian planon. Ŝi donis al ĉiuj sakon multe similantan al sako de varmaj tenerdolĉaĵoj, sed la sako estis malvarma anstataŭ varma. En ilin Belzefa metis frostajn-pikilojn. Tiuj frostajn-pikiloj ne igis la ricevantojn varmaj kaj dolĉaj sed igis ilin malvarmaj kaj agresemaj . Tamen pli bone ol nenio. Ili malhelpis la ŝrumpiĝon de la homoj. Ekde tiam, kiam iu diris «Mi ŝatus unu varman tenerdolĉaĵon », kiuj timis elĉerpiĝon respondis : « Ne eblas doni tion al vi », sed « ĉu vi deziras unu frostan-pikilon ? » !

Kelkfoje du homoj renkontiĝis pensante interŝanĝi varmajn tenerdolĉaĵojn, sed unu el ili lastmomente subite ŝanĝis la opinion kaj ili fine donacis al si reciproke frostajn-pikilojn. De tiam homoj preskaŭ ne plu mortis sed plejparte ili estis malfeliĉaj, malvarmaj kaj malafablaj.

La vivo iĝis ankoraŭ pli malfacila ! La varmaj tenerdolĉaĵoj, kiuj abundis en la komenco tiel kiel la aero, iĝis pli kaj pli maloftaj. Homoj estis pretaj fari ion ajn por akiri ilin.

Antaŭ la alveno de la sorĉistino ili ofte kunvenis en etaj grupetoj por interŝanĝi varmajn tenerdolĉaĵojn, por multe plezurigi unu la alian senfine, ne zorgante pri kiu donacis aŭ ricevis plej multe da tenerdolĉaĵojn. Ekde la plano de Belzefa, ili restis duope, kaj gardis la varmajn tenerdolĉaĵojn unu por la alia. Kiam ili erare donacis varmajn tenerdolĉaĵojn al aliuloj, ili sentis sin kulpaj sciante, ke la partnero suferos pri la manko.

Kiuj ne sukcesis trovi donacantojn devis multe labori por aĉeti ilin. La varmaj tenerdolĉaĵoj iĝis tiel maloftaj, ke kelkaj prenis frostajn-pikilojn kiuj estis nuntempe multnombraj kaj senpagaj. Por kaŝi la pikilojn, ili kovris ilin per plumoj por ŝajnigi varmajn tenerdolĉaĵojn. Sed la falsaj varmaj tenerdolĉaĵoj komplikis la situacion. Ekzemple, kiam du homoj renkontiĝis kaj interŝanĝis falsajn varmajn tenerdolĉaĵojn, jam ili antaŭvidis varman dolĉecon, sed anstataŭ tio ili ricevis nur malbonfarton. Neniu plu komprenis ion ĉar ili vere pensis, ke ili donacis verajn varmajn tenerdolĉaĵojn.

Ja, kiel diveni ke tiuj malagrablaj sensaĵoj estis kaŭzitaj de frostajn-pikiloj ŝajnigitaj en varmaj tenerdolĉaĵoj ? La vivo estis malĝoja. Timoteo bone memoris, ke ĉio komenciĝis kiam Belzefa kredigis al ili ke iutage ili trovos la sakojn da varmaj tenerdolĉaĵoj tute malplenaj.

Jen, kio okazis. Juna kaj floranta virino belrondforme alvenis en tiu malĝoja lando, abunde disdonacis varmajn tenerdolĉaĵojn ne zorgante pri la manko. Ŝajnis ke neniam ŝi aŭdis pri la malbona sorĉistino kaj senpage donacis ilin eĉ se oni ne petis ilin de ŝi.

Homoj nomis ŝin Julia Tutdolĉa sed kelkaj malaprobis, ĉar ŝi instruis geknabojn al la donaco de varmaj tenerdolĉaĵoj ne timante pri la manko. La geknaboj multe amis ŝin ĉar ili sentis sin komforte apud ŝi. Denove ili rekomencis abunde disdonaci varmajn tenerdolĉaĵojn laŭ bezonoj.

La plenkreskuloj maltrankviliĝis kaj decidis promulgi leĝon por protekti la geknabojn kaj ĉesigi la malŝparemon de varmaj tenerdolĉaĵoj. Laŭ tiu leĝo estis malpermesite abunde disdonaci varmajn tenerdolĉaĵojn, kaj de nun permeso estis necesa por la disdonaco.

Malgraŭ tiu leĝo, multe da geknaboj daŭrigis la interŝanĝon de varmaj tenerdolĉaĵoj. Ili disdonacis ilin laŭ la bezono kaj la peto. La geknaboj estis multnombraj, tiel multe kiel plenkreskuloj ; ŝajnis, ke baldaŭ ili venkos.

Nun oni ne scias kiel ĉio finiĝos. Ĉu la plenkreskuloj laŭleĝe ĉesigos la senzorgecon de la geknaboj ? Ĉu la plenkreskuloj sekvos la ekzemplon de la junulino kaj de la geknaboj ekkonsciante ke varmaj tenerdolĉaĵoj neniam mankos ? Ĉu ili memoros pri la neforgeseblaj feliĉaj tagoj, kiam la varmaj tenerdolĉaĵoj abundis ĉar oni donacis ilin tutkore ? *(Fine)*